


PARIZO



GVIDLIBRO

libr 5187

PARIZO, NIA VILAĜO ...

364

“PARIZO, senmorteca akso
PARIZO, akso de la mondo”

Skribis antaŭ pli ol cent jaroj la poeto
Alfredo de Vinji (Alfred de Vigny). —

Eble tiam la poeto pravis. Nun multaj landoj akcelis plenaĝigon k ne plu bezonas ekzemplojn, eĉ el Parizo. Tamen,




Photo Yvon

Ŝajo-Palaco

Parizo daŭre estas nekomparebla urbo pro sia situacio, pro la belo de siaj monumentoj k pejzaĝoj, la multeco de siaj artaĵoj, k pro la profunda, vera atmosfero de libero kiun oni ĝuas en ĝi.

De la antaŭkrista epoko ĝis nun, Parizo regule disvastiĝis sur la du riverbordoj de la Sejno, ĉirkaŭ sia naskiĝnesto, la prainsulo Civito (Cité), de la antikva fiŝkaptistejo ĝis la nuna metropolo kun siaj, ronde, tri milionoj da loĝantoj. Tri milionoj nokte — ni eble devas precizigi — ĉar tage vivas laborante plia duon-miliono da homoj: la ĉirkaŭurbaroj kiuj mult-



KONTROLITA DE LA LITERATURA KOMITATO

313 (44)

440 258



nombre estas okupataj en Parizo. Simpla promeno al unu el la sep parizaj stacidomoj sciigas pli multe ol statistikoj! . . .

La ritmo de la vivo pariza estas rapidega. La surtera cirkulado ne estas pli densa ol, ekzemple, en Londono, sed la subtera fervojo (Metro), estas la pulso de la aktiveco. Tage, du milionoj da individuoj enŝoviĝas en ĝiajn talpejojn.

Por esti konvinkita pri la toleremo de la parizanoj, sufiĉas uzi la subvojon vespere, inter la 18a k la 19a horo. Tiam, vi spertos, ke homa korpo povas esti pli elasta ol kaŭĉuko, pli peza ol ŝtonoj k pli modlebla ol pasto. Ĉio preskaŭ sen grumbloj, eĉ kun ridetoj. . . .

Same, kiel oni ne pentras amatinon konigante la longon de ŝia nazo . . . aŭ la nombron de ŝiaj dentoj, oni ne povas prezenti urbon ŝatindan per ciferoj k statistikoj. Do, kiel eble plej multe ni evitos la ciferojn. Tamen, kiam necesos. . .

Se Germanio estas, laŭ la tradicio, lando de la muziko, Anglio lando de la liriko, Italio lando de la plastikaj artoj, Francio estas lando de la arkitekturo. Konsekvence, la ĉefurbo de Francio montras ankoraŭ nun valorplenajn arkitekturajn verkojn diversepokajn el la pasinto, k la plimulto el la 40 (kvardek) parizaj muzeoj prezentas siajn trezorojn en palacoj aŭ historiaj konstruoj.

Por la granda plezuro de la vizitantoj, oni ankoraŭ ne »modernigis« la urbon, laŭ la stilo de la jarcento de rapideco. Ĉio restis simpla; laŭ homaj proporcioj. Militoj k revolucioj multe detruis, sed en la normalaj periodoj, oni respektis la atestaĵojn de la pasinteco. Malmulte da longaj rektaj linioj, kiuj lacigus la okulojn. Ankaŭ la »montetoj« diversigas la aspekton de la urbo.

La Konkord-placo (Place de la Concorde) estas 88 metrojn pli malalta ol Montmartro (Montmartre), k 83 metrojn pli malalta ol Menilmontan, la monteto de la telegrafo (la unua, kiu ekzistis jam dum la granda revolucio).

Sur la maldekstra riverbordo, la monteto Sankta Genoveva (Sainte Geneviève), »reĝejo de scienco k spirito«, atingas apenaŭ 30 metrojn super la Sejno-nivelo. Do, Parizo ne estas monotona ebenaĵo k ĝi posedas siajn proprajn montaranojn!

Ne unuecon vi trovos en Parizo, sed multnombrajn erojn el la rompita disvolvoĉeno de la historio k de la tempo.

La sama lumo, hele griza, iom cindrokolora ĉirkaŭas ĉiujn partojn de la urbo, kiel senpeza nebulo. Tiu lumo, pli ol aliaj elementoj, estas la ligilo inter la dudek distriktoj kiuj, kiel

helikokonko, disvolviĝas ĉirkaŭ la unua. En tiu ĉi staras la plej riĉa laŭ artaj valoroj, la plej vasta k diversfaka muzeo kiu ekzistas: La Luvro (Le Louvre).

Ĉiu eksterlandano aŭdis pri Montmartro (Montmartre), Montparnaso (Montparnasse), aŭ Elizeaj Kampoj (Champs Elysées), kvankam tio estas nuraj apartaĵoj por la Parizanoj. Por ili la du simboloj estas: la verda rubando de la Sejno kiu, disigante la urbon en du partoj, vagadas inter la arkitekturaj belaĵoj, k la Efel-Turo, tiu efektivigita sonĝo de kapabla k lerta pontokonstruanto. Se la »arkitekturo« de la Efel-Turo estas »nula«, ĝia rolo de signalilo permesas, ke ni pardonu tiun araneaĵon.

Fakte, dum la nokto, kiam . . . »la stratoj trinkas iom da blua inko« . . . senĉese, preter la zumado de la urbo, la turniĝanta lumo de la turo vokas k avertas.

Eĉ se ni emas riproĉi al Parizo ĝian mankon de parkoj — la arbaretoj de Vinceno (Vincennes) k Bulonjo (Boulogne), la Ŝomonmonteto (Buttes-Chaumont), la Monso-Parko (Parc-Monceau) k kelkaj aliaj, fakte ne sufiĉas dum la bela sezono — ni tamen povas ĝui la plej mirindan promenadon, en la centro mem, sur la bordoj de la Sejno, sur la famaj »kajoj« kun ilia originala librovendejaro. La skatoloj de la brokantiŝtoj krenelas la randmureton de la rivero, ambaŭflanke, k la atmosfero, antaŭ tiuj butikoj, memorigas pli muzeon aŭ pilgrimadon ol vendejon.

Tiu centro, ĉirkaŭe de la prainsulo (Cité), estas transirejo inter la komerca urbo pli ĝenerale lokita sur la dekstra riverbordo kun la provizumejoj, la Centraj Haloj (Halles Centrales), pariza ventro, vizitinda je la 5a matene, k la spirita centro de la urbo, la t. n. »Latina Kvartalo« kun ĝia reĝa vojo, la Mikael-bulvardo (Saint Michel). Tiu kvartalo, en kiu staras la altgradaj lernejoj, la Universitato, k. t. p. . . estas tipe studenta: la plej kosmopolita, vivoplena k interesa el Parizo.

Sed la deklivoj de la monteto de Sankta Genoveva ne sufiĉas al tiu »arbo de scio«, kies disbranĉoj jam aneksis kelkajn luksajn distriktojn sufiĉe proksimajn, kiel la kvartalo Ĝermano de la Herbejoj (St-Germain-des-Prés), aŭ preter la Odeon-kvartalo k la Luksemburg-ĝardeno, parto de la Raspaj-bulvardo (Raspail).

En Ĝermano de la Herbejoj, kie staras la plej malnova preĝejo el Parizo, k kie troviĝas la plej delikataj magazenoj de pentraĵoj, antikvaĵoj k artaĵoj, estas samtempe la sidejo de

la modernaj dandoj: la ekzistadistoj. . . aŭ tiuj, kiuj preten-
das tiun nomon, ĉar la veraj disĉiploj de J. P. Sartr (Sartre)
estas sinceraj homoj, kiuj. . . ne frekventas tiun medion!

Sur la Raspaj-bulvardo, staras la Franca Alianco (l' Alliance
Française), kies celo estas diskonigi al la eksterlandanoj la
francan lingvon k kulturon. Ge-studentoj el pli ol 50 landoj




Photo Yvon

Sejno k Praurba insulo

vizitadas tiun lernejon, kies organizado k metodoj estas tre
modernaj.

Tre proksime de la Latina Kvartalo estas la Mober-Placo
(Maubert), ĉefkvartalo de la parizaj almozuloj. Tiu ne tre
estiminda korporacio de ne-laborantoj vivas ĝenerale ne mal-
proksime de la »ventro« pariza, la provizumejo. Ilia malpu-
reco, ilia koloro pensigas pri ratoj, k, kiel tiuj ĉi, antaŭ la
tagiĝo, ili silente proksimiĝas al la rubskatoloj k komencas
sian rikolton. . . Antaŭ la »sidejo« de tiu stranga kompanio,
hodiaŭa postvivaĵo de la »mirakla-korto« de Francisko Vijon
(François Villon), okazas dum bela sezono originala foiro, en
kiu oni vendas precipe cigared-restaĵojn, sed grandkvante.

Kvankam ni trovas 173 distriktajn bibliotekojn sur la pa-

riza listo, ni tamen ne povas silenti pri la nacia Biblioteko
kun ĝiaj 4.000.000 da volumoj, ĝiaj 1.700.000 da manu-
skriptoj k ĝiaj 2.000.000 da bildoj. Tio estas la plej vasta
dokumentaro scienca k literatura en la mondo. Eble pro tio
oni nomis antaŭ nelonge Parizon: la lumurbo!

En la kvartalo de la Nacia Biblioteko (2a distrikto), tro-
viĝas la grandaj gazetresejoj, interalie en la Krüasan-Strato
(Rue du Croissant) kie, en Julio 1914 Jores (Jaurès) estis
murdata. La trinkejo, en kiu okazis tiu dramo, ankoraŭ
ekzistas.

Ĉu ni diru kelkajn vortojn koncerne la 40 parizajn muzeojn?
Ĉiuj artoj, stiloj, teknikoj, sciencoj, historioj, moroj k religioj
estas stud-akireblaj en la kolektoj. Nur la Ŝajo-palaco (Palais
de Chaillot), enhavas 4 diversajn muzeojn interalie la muzeon
de l' homo. La Luvra Muzeo (Le Louvre) kun siaj 6 grandaj
sekcioj postulas tagojn da vizitado. Ĉiu sekcio estas fakte
aparta muzeo. Tie estas prezentataj artaĵoj ekde la egipta
antikveco ĝis la moderna epoko: skulptaĵoj, pentraĵoj, juveloj,
k. t. p. . .

Parizo estas la edeno de la pentristoj. Pluraj dekoj da mi-
loj vivas en tiu urbo. Pro tio ĉiusemajne malfermiĝas k fermi-
ĝas deko da galerioj. La rendevuejo de la pentristoj k de la
artistoj ĝenerale estas Montmartro, la »sankta monteto« sank-
tigita, laŭ ni, per la arto sed, laŭ la legendo, per la sango
de martiroj. La katedralo kiu kronas Montmartron, atestas
pri la tradicio.

La alia poluso de la pentristoj estas Montparnaso (Mont-
parnasse). Sed, se la Montmartranoj aŭdas la kanton de la
birdoj k posedas »videblecon al la ĉielo«, la Montparnasanoj
vivas en la atmosfero de la proksima stacidomo. Fluas senĉese
la »homa maro«, kies kosmopolitismo memorigas la Latinan
Kvartalon.

Rilate al la historio de la urbo, Leono Paŭlo Farg (Léon
Paul Fargue), la plej pariza el la parizanoj, skribis »El la
historio, la urbo tiris la esencon de sia genio k la ĉarmon
de sia personeco. Tiu sinsekvado de jarcentoj, de konstruoj,
de reĝoj, de malvenkoj k triumfoj donis al Parizo, realan
animon . . . animon, kiun oni sentas murmurete tremi, en la

malhela mezo de la distriktoj, same kiel violonoj kiuj agordiĝas en orkestrejo. . .«

La historion de Parizo ni legas sur ĉiu ŝtono de la Luvro, same kiel en la nomo de malnovaj stratetoj aŭ en la Karnavale-Muzeo (Carnavalet).

La ĉefurbo de lando, kiu estis 40-foje invadita (nur en la historia epoko), certe partoprenis la triumfojn k la mizeregojn de la lando ĝin ĉirkaŭanta.

Lutecia (Lutèce), kies loĝantoj nomiĝis »Parizii«, la prapara vilaĝo estis invadita la unuan fojon en 52 antaŭ Kristo. El la romana subigo, atestas la Kluni-Muzeo (Cluny), k la Lutecia Areno (Arènes de Lutèce), ambaŭ en la 5a distrikto.

En 461 (post Kristo), Atilo minacis Parizon: la tradicio rakontas, kiel Genoveva savis la urbon. . . De tiam Parizo havas patroninon. En Panteono pentraĵoj de Puvi de Šavan (Puvīs de Chavannes) montras la gardistaron de la urbo. Dum la 9a jarcento la urbo estis plurfoje elrabita.

Parizo estis la unua Eŭropa urbo, kiu ricevis universitaton (en 1200). Jam sub la regno de Ludoviko la VIa (1108 ĝis 1137), Parizo akiris firman reputacion dank'al siaj lernejoj, kies majstroj estis Petro Lombar k Abelar (Pierre Lombard k Abelard). La ĉefkatedralo (Notre-Dame) estis ekkonstruita sub Ludoviko la VIIa (1137-1180), k la diverseco de ĝia aspekto montras, ke dum la konstruado la gotika arto evoluis.

La centra provizumejo ekzistis jam sub Filipo-Aŭgusto (1180-1223), k la unua Luvro, dika fortikaĵo, estis starigita »ĉe la fino de la urbo« sub la sama regado.

Henriko la IVa dum la religiaj militoj atakis 4 foje Parizon. En 1789 la falo de la Bastiljo (Bastille), simbolo de la venkonta revolucio, malfermis la aperepokon de pluraj demokratioj en Eŭropo. La plej gravajn sangajn horojn de la granda Revolucio travivis la parizanoj.

La urbo firmigis sian reputacion de antaŭenemo per la revolucioj de 1830 k 1848. Se la 2a imperio naskiĝis en Parizo, la Revolucio de septembro 1870 finis ĝin, k aperigis la trian respublikon. Ek de marto 1871 la revolucia Komuno de Parizo estris la urbon dum 2 monatoj k malaperis en la terura fintagedio de Perlaŝez (Père Lachaise).

Unu el la plej emociaj monumentoj de Parizo, la Muro de la Federacianoj (Mur des Fédérés), atestas pri tiu murdo kies datreveno estas ĉiujare salutata de la laboristaro. Pri epoko pli proksima de ni ne necesas paroli.

Pli k pli malvasta iĝas la mondo k historio ne plu limiĝas al urboj aŭ nacioj, sed ligas la tutan homaron.

Resumi tion, kion oni vidas, sentas, pensas en Parizo, ne estis nia celo. Ankaŭ ne translokigi la nacian ŝovinismon el la tuta lando al tiu urbo ĝuste. . .

La vizitantoj mem juĝos k tre certe rimarkos tute »senmoralan« sintenon de kelkaj el niaj kunvivantoj parizaj k multajn »trosenĝenajn« manifestaciojn. Niaj amikoj bonvolu, antaŭ ol pravigi »Tartufon« k la burĝanimulojn, atenti pri jeno: en tiu urbo, oni tre ofte ridas . . . aŭ ridetas, k tio estas signo de morala bonfarto. Cetere, ĉu ĉiu libera homo ne devus aplaŭdi, spite de ĉiu moralo, al manifestacio de bona individua libero, nia plej kara posedo, terure minacata de la progreso mem, kiun ni ĉiuj alvokas? . . .

Sed, ni lasu poeton konkludi:

„Parizo, lum' k ombro! Pariz', princip' k celo!
Malbon' en ĝi ne mankas? Eble, sed kiom belo!
Sed kiom grando! Sajnas — tiele ĝi nin sorĉas —
Ke tute nova mondo ĉe tiu flam' sin forĝas!“

VIDINDAĴOJ KURIOZAĴOJ

1 — ĜARDENOJ — PARKOJ

Botanika ĝardeno (Jardin des Plantes). Priskribita sur paĝo.....	22
Bulonja arbaro (Bois de Boulogne)	51
Luksemburga ĝardeno (Jardin du Luxembourg).	20
Lutecia areno (arènes de Lutèce).....	45
Marsa kampo (Chamr de Mars).....	30
Monso-parko (Parc Monceau)	60
Monsuri-parko (Parc Montsouris).....	60
Perlaŝez-tombejo (Cimetière du Père-Lachaise).	43
Reĝopalaca ĝardeno (Jardin du Palais Royal).....	15
Senklu-parko (Parc de Saint-Cloud)	61
So-parko (Parc de Sceaux)	62
Ŝomon-montetoj (Buttes-Chaumont)	49
Tegoleja ĝardeno (Jardin des Tuileries) ..	15
Versajla parko (Parc du Château de Versailles)	63
Vincena arbaro (Bois de Vincennes)	55

2 — MONUMENTOJ

Dionizi-pordego (Porte Saint-Denis), 17a jarcento.....	26
Efelturo (Tour Eiffel), 1889	18
Fontano de la Senkulpuloj (Fontaine des Innocents) -Renesanco.	59
Karusel-arko (Arc de Triomphe du Carroussel) - 1808.....	16
Marten-pordego (Porte Saint-Martin - 17a jartento.....	26
Monumento al la Respubliko - 1883.....	26
Napoleona maŭzoleo (Tombeau de Napoléon) - 1843	61
Obelisko -13a jarcento antaŭ Kristo- starigita ĉi tie en 1836.....	16
Triumfarko (Arc de Triomphe de l'Etoile) 1806	17
Triumfo de la Respubliko - 1899.....	31
Turo Sankta Jakobo (Tour Saint Jacques) - 16a jarcento.....	33
Vandom-kolono (Colonne Vendôme) - 1810	62

3 — MUZEOJ

a) — ARTAJ MUZEOJ:

Belaj artoj de Pariza urbo, en Malgranda Palaco. Subtera stacio: Roosevelt aŭ Invalides.	
Gobelin-manufakturo (Gobelins), tapiŝoj. — Avenue des Gobelins. Subtera stacio: Gobelins aŭ Place d' Italie.	
Kluni (Cluny). artaj objektoj de la Mezepoko k Renesanco. — Rue du Sommerard. Subtera stacio:Odéon aŭ Maubert.	
Luvro (Le Louvre), priskribita sur paĝo 15 Subtera stacio: Louvre aŭ Palais-Royal.	
Modernaj Artoj (Arts Modernes). — Avenue du Président Wilson. Subtera stacio: Iéna.	
Rodin, skulptaĵoj. — Rue de Varennes. Subtera stacio: Invalides.	
Sernuŝi (Cernuschi), aziaj artoj. — Avenue Vélasquez. Subtera stacio: Monceau.	
Sevr-manufakturo (Sèvres), ceramiko. — Trans la Sejno apud la Senklu-parko. Subtera stacio: Pont de Sèvres.	

b) — HISTORIAJ MUZEOJ:

Grevin, — priskribita sur paĝo 25 Subtera stacio: Richelieu-Droust.	
Karnavale (Carnavalet), pri Parizo. — Rue de Sévigné. Subtera stacio: St. Paul.	
Naciaj arkivoj (Archives Nationales). — Rue des Archives. Subtera stacio: Rambuteau.	
Prinavigacia muzeo (Musée de la Marine). — En Ŝajo-Palaco. Subtera stacio: Trocadéro.	

c) — SCIENCAJ MUZEOJ:

Artoj k eltrovoj (Arts et Métiers). — Rue St. Martin. Subtera stacio: Arts et Métiers.	
Kolonia muzeo (Musée des Colonies). — Avenue des Colonies Subtera stacio: Porte Dorée.	
Naturaj sciencoj (Histoire Naturelle). — Priskribita sur paĝo 22 Subtera stacio: Austerlitz.	
Palaco de la eltrovoj (Palais de la Découverte), priskribita sur paĝo 18 Subtera stacio: Roosevelt.	
Pedagogia muzeo (Musée Pédagogique), Rue d' Ulm. Subtera stacio: Luxembourg.	
Prihoma muzeo (Musée de l' Homme), priskribita sur paĝo 19 Subtera stacio: Trocadéro.	

4 — PALACOJ, KASTELOJ, NOBELDOMOJ

Burbon-palaco (Palais Bourbon), 18a jarcento, priskribita sur paĝo	29
Granda k malgranda palacoj (Grand et Petit Palais), 1900	18
Invalid-domo (Les Invalides), 17a jarcento.....	29
Jugeja palaco k Konsierjeri (Palais de Justice et Concier- gerie) 14a jarcento	13

	Priskribita sur paĝo	
Kastelo de Versajlo (Château de Versailles), 17a jarcento	"	63
Luksemburga palaco (Palais du Luxembourg), 17a jarcento	"	20
Luvra palaco (Le Louvre), Renesanco	"	14
Milita Lernejo (Ecole Militaire), 18a jarcento	"	29
Nobeldomo Sans (Hôtel de Sens), 15a jarcento	"	62
Nobeldomo de Kluni (Cluny), 15a jarcento	"	44
Operdomo (Opéra), 1875	"	19
Panteono (Panthéon), 1789	"	21
Reĝa palaco (Palais Royal), 18a jarcento	"	15
Sorbono (Sorbonne), diversepoka	"	44
Ŝajo-palaco (Palais de Chaillot), 1937	"	19
Urbdomo (Hôtel de Ville), 1883	"	12

5 — PLACOJ, AVENUOJ, BULVARDOJ. —

Bastilja placo (Place de la Bastille)	"	35
Elizeaj Kampoj (Champs-Élysées)	"	17
Grandaj Bulvaroj (grands boulevards)	"	25
Konkord-Placo (Place de la Concorde)	"	16
Stel-placo (Place de l'Étoile)	"	17
Vandom-Placo (Place Vendôme)	"	62
Vogeza placo (Place des Vosges)	"	33

6 — PREĜEJOJ. —

Baziliko de Montmartro (Sacré-Cœur)	"	20
Ĉefkatedralo (Notre-Dame)	"	12
La Sankta Kapelo (La Sainte Chapelle)	"	14
Magdalena preĝejo (Madeleine)	"	20
Moskeo (La Mosquée)	"	60
Sankta Ĝermano (Saint-Germain-des-Prés)	"	61

7 — ZOOLOGIO — BOTANIKO

Laŭklimata parko (Jardin d'Acclimatation), en la Bulonja arbaro — Subtera stacio: Sablon	"	54
Akvario de la Kolonia Muzeo — Subtera stacio: Porte-Dorée	"	55
Akvario de Ŝajo-Palaco — Subtera stacio: Trocadéro Botanika ĝardeno (Jardin des Plantes), botaniko k zoologio — Subtera stacio: Austerlitz	"	22
Zoologia parko (Parc Zoologique de Vincennes), — Subtera stacio: Porte-Dorée	"	57

8 — DIVERSAĴOJ

Centraj Haloj (Halles Centrales), provizumejo	"	47
Kloakoj (égouts)	"	59

Libro-brokantistoj (bouquinistes)	Priskribita sur paĝo	60
Metro-vojo (Métro)	"	60
Muro de la Federitoj (Mur des Fédérés)	"	43
Poŝtmarka borso (Bourse aux Timbres)	"	61
„Bul“-brokantejo (Marché aux Puces)	"	61
Romanaj ruinoj (Thermes)	"	61
Studenta civito (Cité Universitaire)	"	62

GRANDAJ MAGAZENOJ:

Bazar de l' Hôtel de Ville (Subtera stacio: Hôtel de Ville) — Bon Marché (Subt. stac.: Sévres-Babylone) — Galeries-Lafayette (Subt. stac.: Chaussée d' Antin) — Louvre (Subt. stac.: Palais Royal) — Printemps (Subt. stac.: Havre-Caumartin) — Samaritaine (Subt. stac.: Pont-Neuf).

PERSPEKTIVOJ:

de la ponto Austerlitz valen.
 — de la Episkopejo (Archevêché) al la ĉefkatedralo.
 — de la Artoj (des Arts) al la prainsulo, Luvro.
 de la Konkord-ponto al la Magdalena preĝejo.
 de la ponto Aleksandro III al la Invalid-Domo.
 de la Triumfarko al la Luvra Palaco.
 de Karusel-arko al la Triumfarko.
 de Ŝajo-palaco al la Efel-Turo k Milita lernejo.
 de la Milita lernejo al la Ŝajo-Palaco.

PANORAMOJ:

el la supro de la Baziliko.
 — de la ĉefkatedralo.
 — Efelturo.
 — Julia kolono.
 — Panteono.
 — Rokego de la Zoologia parko.

NI NEPRE VIZITU.....

Se oni disponas pri malmulte da tempo, konsilinde estas viziti Parizon laŭ la sekvanta skemo:

- 1^o - Subtera stacio: »Hôtel de Ville«. Urbdomo, ĉefkatedralo, Juĝeja Palaco kun Konsierĵeri (Conciergerie), Luvro, Reĝa Palaco, Tegoleja ĝardeno, Konkord-placo, Elizeaj Kampoj, Triumfarko.
- 2^o - Subtera stacio: »Franklin Roosevelt«. — Granda k Malgranda Palacoj, Ponto Aleksandro la IIIa, Efel-Turo, Ŝajo-Palaco.
- 3^o - Subtera stacio: »République«, Grandaj Bulvaroj, Operdomo, Magdalena preĝejo, Konkord-Placo, Burbon-palaco.
- 4^o - Subtera stacio: »Place Blanche«, Pigal-placo, Montmartra Baziliko.
- 5^o - Subtera stacio: »Odéon«, Mikael-bulvardo, Luksemburg, Panteono, Botanika ĝardeno.

1^o — URBDOMO (Hôtel de Ville)

Subtera stacio: »Hôtel de Ville«

De 1357 la parizaj urbadministrantoj kunvenas en tiu loko. En 1533 oni ekkonstruis urbdomon finitan nur en 1606, laŭ la planoj de F. Miron. Ĝi estis bruligita la 24an de majo 1871.

De 1873 ĝis 1883, Balu (Ballu) k Depert (Deperthes), starigis la aktualan konstruaĵon, kiu, laŭ pli grandaj dimensioj, similas la antaŭan (Renesanca stilo). Ekstere, 136 statuoj de famuloj. Areo: 14.000 kvadratmetroj. Sur la placo, oni ekzekutis dum la reĝa epoko famajn kondamnitojn.

2^o — ĈEFKATEDRALO (Notre Dame)

Subteraj stacioj: Saint-Michel aŭ Hôtel de Ville.

Ekkonstruigita en 1163 de Maŭrico de Suli (Sully), pariza episkopo, sur la loko kie estis la »Merovea« katedralo. Ĝi havas unu el la plej vastaj k belaj navoj mezepokaj. Ĝian

unuan ŝtonon lokigis la papo Aleksandro la IIIa k la reĝo Ludoviko la VIIa. La konstruado estis daŭrigata de Filipo-Aŭgusto k finita ĉirkaŭ 1245, koncerne la ĝeneralajn partojn. Konservita en nebona stato, laŭ arkitekta vidpunkto, ofte eĉ difektita dum la XVIIIa jarcento, ne prizorgita k stumpigita dum la Granda Revolucio, aranĝita kelkfoje mallerte ĉe komenco de la XIXa jarcento, ĝi estis definitive riparata de Viole le Duk (Violet le Duc) de 1845 ĝis 1864.

La dimensioj estas: 141 m. × 48 m.

La ĉefa fasado ĉe la antaŭpreĝeja placo konsistas el tri partoj vertikalaj. La tri pordegoj estas tre rimarkindaj pro siaj skulptaĵoj. La du kvarangulaj turegoj, kies flankoj mezuras 16 metrojn, havas sian pinton 67 metrojn super la tero. En la suda turego troviĝas la fama sonorilego »Bourdon«, kiu pezas 13.000 kilogramojn.

En la interno oni vidas:

- la ĉefnavon (XIIIa jarcento), 108 m. × 45 m., kiu konsistas el 31 ogivaj arkadoj k estas lumigata per 37 grandaj fenestroj;
- du malgrandajn navojn ĉe ambaŭ flankoj;
- multajn kapelojn;
- larĝan tribunon kontinuan, el ogivaj arkadoj, el kie oni, en la pasinta tempo, kroĉis la flagojn prenitajn de la venkitoj;
- virgulin-kapelon, malantaŭ la ĥorejo;
- ĥorejon kun tre belegaj sidfakoj el skulptita ligno;
- orgenon kun 6.000 tuboj k 5 klavaroj; ĝi datumas de 1730;
- multajn tombojn, vidindajn vitraĵojn, pentraĵojn k freskojn;
- »Trezorejon« kun multvaloraj riĉaĵoj.

El la supro de la turoj oni ĝuas unu el la plej belaj panoramoj de Parizo.

Konsilinde estas ĉirkaŭiri la katedralon.

3^o — JUĜEJA PALACO (Palais de Justice)

Subtera stacio: Cité.

Oni konjektas, ke staris tie la palaco de la romaj guberniestroj.

Senĉese riparita k rekonstruita dum kvin jarcentoj, tiu konstruaĵo estis la ĉefa restadejo de la reĝoj, ĝis Karlo la VIIa (1403-1461) igis ĝin parlamentejo. Ĝi grave brulis plurfoje (1618-1630-1737-1776-1871). Tie estas la fame konata malliberejo *Konsierĵeri* (*Conciergerie*), kie estis enkarcerigataj Rava-

jak (Ravaillac), Maria-Antonia (Marie-Antoinette), Robespier k multaj gravuloj dum la Granda Revolucio.

Ĝia horloĝturo datumas de la XIVa jarcento. En la sama konstrugrupo staras la SANKTA KAPELO (Sainte-Chapelle). De 1245 ĝis 1248 konstruita de Petro de Montro (Montereau) k riparita de Viole le Duk (Viollet le Duc). La admirinda preĝejo enhavas du surmetitajn kapelojn k belegajn vitraĵojn gotikajn.




Photo Yvon Perspektivo al Karusel-placo k al Luvro-palaco

4^o — LUVRO (Le Louvre)

Subteraj stacioj: Louvre aŭ Palais-Royal.

La plej bela k vasta palaco en Parizo. Sur tiu loko staris en la pasinto (752-987) ĉasrendevuejo k fortikaĵo en arbaro, kie vivis tiam multaj lupoj. Ĉar en la latina lingvo vulgara, la vorto lupo estis »luparus«, oni nomis tiun lokon »Louvre«.

La reĝo Francisko la I-a faligis la konstruojn k komencis konstruadi, laŭ planoj de Petro Lesko (Pierre Lescot), en la jaro 1541 modernan palacon, kiu estis finita de la reĝo Henriko la II-a dum 1548. La eksteraj konstruoj estis finitaj nur dum 1856.

Tiu palaco konsistas el diversepokaj stiloj, precipe mezepoka k renesanca, ĉar la reĝoj Karlo la IX-a, Henriko la IV-a, Ludoviko la XIII-a, Ludoviko la XIV-a, la imperiestroj Napoleono la I-a k Napoleono la III-a aldonis ĉiu novajn partojn.

La interna korto en la malnova parto havas flankojn, kiuj mezuras ĉiu ekzakte cent metrojn.

Luvro forbrulis parte dum la Komuno (1871) k estis rekonstruita. Ĝi entenas unu el la plej gravaj muzeoj de la mondo, dividita jene:

- 1^o) - grekaj k romanaj antikvaĵoj;
- 2^o) - orientaj antikvaĵoj;
- 3^o) - egiptaj antikvaĵoj;
- 4^o) - skulptaĵoj el la Mezepoko, Renesanco k Moderna epoko;
- 5^o) - Pentraĵoj k desegnoj;
- 6^o) - Artaj objektoj de la Mezepoko, Renesanco k Moderna epoko.

5^o — REĜA PALACO (Palais-Royal)

Subtera stacio: Palais Royal.

La palaco estis starigata de 1629 ĝis 1636 laŭ la peto de Riŝelje (Richelieu). La planoj estas de Lemersje (Lemercier).

Proksimume en 1781 la ĝardeno estis ĉirkaŭata per butikoj laŭ ordono de Ludoviko-Filipo d'Orlean (Orléans).

La 12an de julio 1789 Kamilo Demulen (Camille Desmoulins), solene alparolis la popolon antaŭ la venkopreno de la Bastiljo.

En 1790 la arkitekto Lui (Louis) konstruis la »Francan Teatron«. En 1801, Napoleono instalas administrejojn k en 1807 la borson k la komercan tribunalon. La konstruoj bruigitaj dum la Komuno estis restarigitaj de 1872 ĝis 1876. En la ĝardeno staras statuoj de Viktor Hugo (verko de Rodin), de Kamilo Demulen (verko de Boverie).

6^o — TEGOLEJA ĜARDENO (Tuileries)

Subteraj stacioj: Tuileries aŭ Concorde.

Dum 1564, sur terenoj okupitaj de tegolfarejoj, reĝino Katarina de Mediĉi (Catherine de Médicis), ekkonstruigis palacon, en kiu loĝis malofte la reĝoj. Konsulo Bonaparto elektis ĝin kiel oficialan restadejon. De tiam la francaj regnestroj loĝis tie, ĝis la palaco estis tute bruligata dum la Komuno (1871) k anstataŭata de ĝardeno.

La fame konata ĝardeno (Tuileries), komencita dum 1600, estis rearanĝata de Lenotr (Lenôtre). Ĝi mezuras 26 hektarojn.

Kiam oni staras antaŭ la statuo pri Gambeta, oni povas admiri belegan perspektivon ĝis la Triumfarko de la Stelplaco.

En la ĝardeno staras la KARUSEL-TRIUMFARKO (Carroussel). La parto lokita antaŭ la statuo de Gambeta, inter la flankoj ekstremaj de Luvro ĉe la komenco de la Tegoleja ĝardeno nomiĝas Karusel, ĉar tie, dum 1662, sub la regado de Ludoviko la XIVa okazis fama rajdista ludo.

Tie Napoleono la I-a konstruigis en 1806 triumfarkon, kiu similas tiujn de Konstantino k Septimo-Severo en Romo. Ĝiaj dimensioj estas: 15 m. alta, 20 m. larĝa, 7 m. dika. Kvankam, pro la ĉirkaŭaĵo, ĝi aspektas premegita, tiu monumento estas vidinda, kiel la plej bela arkitekta elpenaĵo de la Napoleona epoko.



Photo Yvon

Konkord-placo

7^o — KONKORD-PLACO (Place de la Concorde)

Subtera stacio: Concorde.

Konstruita dum la regado de Ludoviko la XVa. Limigita ĉe la norda parto per du simetriaĵoj monumentoj verkoj de la arkitekto Gabriel (1763-1772). Ok kolosaj statuoj el ŝtono, prezentantaj la grandajn ŭrbojn de Francio, ĉirkaŭas la placon.

Dum la Revolucio 1789 gilotino staris en ĝia mezo. Estis senkapigitaj: Ludoviko la XVIa, reĝino Maria-Antonia, Ŝarlota Korde (Charlotte Corday), Kamilo Demulen (Camille Desmoulins), k. t. p. . .

En 1836 oni starigis sur la sama loko obeliskon de RAMSESO la IIa (13a jarcento antaŭ J.K.). Ĝi estas unuŝtona, el roza granito, 22,83 m. alta, venas el Luksor, k estas donaco de Egiptio al reĝo Ludoviko-Filipo; ĝi pezas 250 tunojn.

En la akso de la Norda parto komenciĝas la Reĝa strato (Rue Royale), k funde oni vidas la Magdalenan preĝejon, 1764-1842 (La Madeleine).

Je la orienta parto etendiĝas la Tegoleja ĝardeno (Les Tuileries), borderita de la Rivoli-Strato.

Je la okcidenta parto, inter la dekoraciaj ĉevaloj alportitaj el la Marli-Kastelo (Château de Marly), malfermiĝas avenuo de la Elizeaj Kampoj (Champs Elysées), k maldekstre, la Reĝina Avenuo (Cours-la-Reine).

Je la suda parto la placo estas ligita al la maldekstra bordo de la Sejno per la Konkord-ponto konstruita de Perone (Peronet), 1787-1790, k finita per la ŝtonoj de la Bastiljo.

8^o — ELIZEAJ KAMPOJ (Champs Elysées)

Subteraj stacioj: Concorde aŭ Etoile

La Elizeaj Kampoj estas la plej bela pariza avenuo k luksega promenejo. Ĝi mezuras laŭlonge 1.880 metrojn. La larĝo varias inter 300 ĝis 400 metroj, kiam estas ĝardenoj ambaŭflanke, k poste ĉirkaŭ 100 metroj. Ekde la Konkord-placo la promonado estas rava. Sub la regno de Henriko la IVA kuŝis tie nur kampoj k marĉoj (16a jarcento). Ekde 1616 oni kreis aleojn, k iom post iom tiu loko estis nomata »Grand-Cours«, k poste »Champs-Elysées«. Sub la regno de Napoleono la IIIa kavaliroj k amazonoj, cirkulis meze de kupeoj k luksaj veturiloj. La nuna avenuo perdis la tiaman aristokratian aspekton. Homamasoj konstante promenas antaŭ riĉegaj butikoj, teatroj, kinejoj, hoteloj, modejoj, kudrejoj, dum miloj da homoj sidas antaŭ luksaj trinkejoj.

9^o — TRIUMFARKO (Arc de Triomphe de l'Etoile)

Subtera stacio: Etoile

Sur la stelforma placo el kie eliras 12 avenuoj, staras la



fame konata Triumfarko. Napoleono la 1a ordonis ĝian konstruiĝon en 1806.

La laboroj forlasitaj dum la Restarigo de l'reĝeco, estis finataj inter 1832-1836. La planojn faris arkitekto Ŝalgren (Chalgrin), alto: 50 m., larĝo: 45 m., diko: 22 m. Sur la ŝtonoj estas gravuritaj la nomoj de 660 generaloj de la unuaj Respubliko k Imperio. Oni atentis la ornamaĵojn k precipe la altreliefon de Rud (Rude): La Marseljezo. El la supro oni ĝuas tre belan panoramon.

Tiu arko estas la plej grava konstruo el tiu speco. Sube kuŝas la tombo de la Nekonata Soldato, kies flamo lumas seninterrompe de la 1a de novembro 1923.

10^o — GRANDA PALACO (Grand Palais) MALGRANDA PALACO (Petit Palais)

Subtera stacio: Franklin Roosevelt.

Ambaŭ estis konstruitaj okaze de la internacia ekspozicio de 1900. La Granda enhavas grandan halon (192 m. x 45 m.), en kiu okazas multaj diversaj ekspozicioj. En la okcidenta parto situas la PALACO DE LA MALKOVROJ (Palais de la Découverte).

Kreata okaze de la ekspozicio de 1937, ĝi fariĝis konstanta stablo de scienca klerigado publika; ĝi entenas jenajn sekciojn: matematiko, astronomio, fiziko, ĥemio, biologio k medicino. La fakoj estas daŭre aktualigataj.

La Malgranda Palaco entenas Belartan Muzeon de la Pariza urbo.

11^o — EFEL-TURO (Tour Eiffel)

Subteraj stacioj: Trocadéro aŭ Ecole Militaire.

Metala konstruo starigita por la ekspozicio de 1889 de la inĝeniero Efel (Eiffel). Ĝi estas 300 metrojn alta. La unua plataĵo estas 57 metrojn super la tero, la dua 115 metrojn, k la tria 276 metrojn. Super la tria estas kupolo kun potenca lanternego superita per malgranda plataĵo je 300 metroj, kie Efel instalas sian laborejon.

La turo konsistas el 12.000 malsamaj pecoj kunigitaj per 2.500.000 nitoj. Ĝi pezas 7.000 tunojn. La fundamento necesigis 12.000 kubajn metrojn el diversaj materialoj.

Oni povas grimpi ĉu per ŝtuparo, ĉu per liftoj. El la supro oni ĝuas unikan panoramon, k dank'al bela vetero oni povas vidi ĝis 90 kilometroj.

12^o — ŜAJO-PALACO (Palais de Chaillot)

Subtera stacio: Trocadéro.

Konstruita okaze de la ekspozicio de 1937 sur la loko de antaŭa Trokadero-Palaco, ĝi konsistas el du grandegaj aloj kurbaj, 195 m. longaj. Meze du pavilonoj disigitaj per 60-metra teraso, sub kiu estis konstruita grandega teatra salono (ĝi povas enteni 3.000 personojn). El tie oni ĝuas senkomparan panoramon al la Sejno, Efel-Turo k Milita Lernejo.

En la dekstra alo estas la PRIHOMA MUZEO (Musée de l'Homme). Por la publika klerigado ĝi formas vastan sintezon de la prihomaj sciencoj, etnografio, antropologio, k. t. p. . .

En la sama alo estas la MUZEO PRI NAVIGACIO (Musée de la Marine). En la maldekstra alo estas la MUZEO PRI FRANCIAJ ARTOJ K TRADICIOJ (Musée National des Arts et Traditions Populaires).




Photo Yvon

Operdomo

13^o — OPERDOMO (Opéra)

Subtera stacio: Opera.

Starigita laŭ la planoj de Garnje (Garnier) de 1862 ĝis

1875, riparita en 1936. Ĝi enhavas 2158 sidlokojn, belegan ŝtuparon k promen-salonon.

Laŭ la kovrita areo: 11.000 kvadratmetroj, ĝi estas la plej vasta el la mondo. Unu el la kvar skulptitaj grupoj de la fasado, nome la Danco, la antaŭlasta k dekstre, verkita de Karpo (Carpeaux), estas fama.

14^o — MAGDALENA PREĜEJO (La Madeleine)

Subtera stacio: Madeleine.

La preĝejo (1764-1842), kiu ne havas transepton k flankajn navojn, similas al greka templo. La 52 kolonoj el korinta stilo, kiuj ĉirkaŭas ĝin, estas 20 metrojn altaj. Skulptaĵo de Lemer (Lemaire), sur la frontono de la fasado, prezentas la Lastan Juĝon. La bronza pordego estas ornamita per bareliefoj inspiritaj de Ordonoj de la Dekalogo. De la perono, 28 ŝtupojn alte, oni ĝuas belan perspektivon al la Reĝa Strato, Obelisko, Burbon-Palaco (Deputitejo) k al kupolo de la Invalid-Domo.

15^o — MONTMARTRA BAZILIKO (Basilique du Sacré-Coeur)

Subtera stacio: Pigalle.

La teraso estas lokita 100 metrojn super la Sejno-nivelo. La konstruado de la preĝejo okazis de 1875 ĝis 1911. La kupolo k la kvadrata turo estas 84 metrojn altaj. En la turo pendas unu el la plej dikaj sonoriloj el la mondo: ĝi estas tre belsona k pezas ĉirkaŭ 20.000 kg., sen la akcesoraĵoj.

Pro la nefirma tereno, la fundamento postulis la fosadon de 83 putoj, 38 metrojn profundaj, plenigitaj per masonaĵoj k kunigitaj per arkoj. El la teraso oni ĝuas tre belan panoramon sur Parizo. El la kupolo oni povas vidi ĝis 50 km. ĉirkaŭe.

16^o — LUKSEMBURGA ĜARDENO (Jardin du Luxembourg) LUKSEMBURGA PALACO

Subteraj stacioj: Luxembourg aŭ Odéon.

La ĝardeno, 23-hektara, estas unu el la plej belaj de Parizo. Atentu la fontanon de Mediĉi (Médicis) k la monumenton al E. Delakrŭa (Delacroix).

La palaco, malnova reĝa restadejo, estis konstruata ekde 1615 por Maria de Mediĉi. Ĝi estas nun okupata de la Respublika Konsilantaro.



Photo Yvon Montmartra baziliko

17^o — PANTEONO (Panthéon)

Subtera stacio: Luxembourg.

Konstruita laŭ grek-roma k mezepoka stiloj, ĝi nomiĝis antaŭe preĝejo Sankta Genoveva (Sainte Geneviève) k estis komencita en 1758 laŭ la planoj de Suflo (Soufflot). Ĝi estis finkonstruita en 1789. La konstruo estas 110 m. longa, 82 m. larĝa k 83 m. alta.

En 1791 la Konstituci-donanta deputitaro (La Constituante) decidis deponi en ĝin la cindrojn de famaj homoj. La korpo de Mirabo (Mirabeau) estis la unua tie deponita, k iom poste sekvis tiu de Volter (Voltaire).

De tiam ĝi nomiĝis Panteono (nomo, kiu difinis en la antikva epoko — templon konsekritan al ĉiuj dioj —).

Napoleono la I-a redonis ĝin al la dia kulto en 1806. Ĝi refariĝis mortintejo dum la regado de Ludoviko-Filipo. Napoleono la III-a denove refaris el ĝi preĝejon. En 1885 oni reigis ĝin laika templo por akcepti la cindrojn de Viktor Hugo. Dum la Komuno la konstruo estis unu el la ĉefaj centroj de la federacianoj. El la kupolo oni ĝuas tre belan panoramon.



Photo Yvon

Panteono

18^o — BOTANIKA ĜARDENO (Jardin des Plantes)


Subtera stacio: Austerlitz.

Ĝi estis kreata en 1626 iniciate de du kuracistoj de Ludoviko la XIII-a. Unuatempe »reĝa ĝardeno de kuracaj herboj«, ĝi poste fariĝis lernejo pri botaniko, natura historio k farmacio.

La ĝardeno estis malfermata al la publiko en 1630. En 1795 oni instalas tie la unuan bestomontrejon. Dum la 19-a jarcento superaj scienculoj inter kiuj: Voklen (Vauquelin), Lamark (Lamarck), Bufon (Buffon), Kuvje (Cuvier), Ŝevrel (Chevreul), Bekrel (Becquerel) k. t. p. . . certigis al la naturscienca muzeo

disradiadon tutmondan. Ĝi kovras 28 hektarojn k konsistas el jenaj partoj:

- botanika ĝardeno kun 11.000 specoj de plantoj sisteme ordigitaj;
- galerioj pri:
 - anatomio, paleontologio, botaniko, mineralogio, geologio, zoologio;
- montrejo de insektoj k malgrandaj bestoj;
- bestejo;
- tre agrabla labirinto kondukas al la supro de la monteto, el kie oni havas perspektivon al la ĝardenoj k al la moskeo.



UNUA PROMENADO

- 1 — KONKORD-PLACO (Place de la Concorde)
- 2 — MAGDALEN-PLACO (Place de la Madeleine)
- 3 — OPER-PLACO (Place de l'Opéra)
- 4 — DIONIZ-PORDEGO (Porte Saint-Denis)
- 5 — MARTEN-PORDEGO (Porte Saint-Martin)
- 6 — RESPUBLIKA PLACO (Place de la République)
- 7 — BASTILJAPLACO (Place de la Bastille)

1 — KONKORD-PLACO:

Priskribita sur paĝo: 16.

Laŭ la Reĝa strato (Rue Royale), konstruita en 1732, trafu la Magdalenanplacon (La Madeleine).

2 — MAGDALEN-PLACO:

La Preĝejo priskribita sur paĝo: 20.

3 — OPER-PLACO:

Unu el la parizaj placoj, kie plej svarmas homoj k veturiloj en Parizo. La Operdomo, priskribita sur paĝo: 19.

Turninte la dorson al la teatro, oni vidas antaŭ si la Oper-avenueon, kiu kondukas al la Luvra Palaco (Le Louvre), k al la Sejno, la pariza riverego. Dekstre, la Paco-strato (Rue de la Paix) borderita per luksaj magazenoj, finiĝas ĉe la Vandom-placo (Place Vendôme), proksime de la Tegoleja ĝardeno (Les Tuileries). Simetrie, troviĝas 4-a-de-septembro-strato (4 Septembre), kiu kondukas al la Borso (La Bourse).

Dekstre de la teatro k perpendikle al la Oper-Avenueo, estas la Kapuĉulina Bulvarado (des Capucines). Ekiru maldekstren laŭ la Grandaj Bulvaradoj (limo de Parizo dum la regado de Ludoviko la 13a). La unua, la Ital-teatra-bulvarado (Boulevard des Italiens), finiĝas ĉe la stratkruciĝo Riŝlje Druo (Richelieu-Drouot).

Sur la Montmartra bulvarado (Boulevard Montmartre), maldekstre, oni rimarkas ĉe n^o 10 la Grevin-muzeon fonditan en

1882. En ĝi estas prezentataj konataj eminentuloj, scenoj el la franca historio: epoko de Johanino d'Arko (Jeanne d'Arc), Ludoviko la 14a, Revolucio 1789, Napoleono, k. t. p. . . La personoj el vakso, je natura granda, surhavas aŭtentikajn tiuepokajn kostumojn. Sur la kontraŭa trotuaro, ĉe n^o 11, malfermiĝas la Panorama trairejo (Passage des Panoramas), (1799), ĉe n^o 7 oni vidas la Variete-teatron (Théâtre des Variétés), starigitan en 1807; ĉe n-oj 2 k 6, en Poasonjer-bulvardo (Boulevard Poissonnière) oni vidas fasadon de grava ĵurnalo, k poste la Gimnazian teatron (Théâtre du Gymnase) konstruitan en 1820.

4 — DIONIZI-PORDEGO:

Starigita en 1672 por soleni la venkojn de Ludoviko la 14a, ĉe la Rejno. La planojn faris Blondel k la skulptaĵojn la fra-toj Angje (Anguier). La arko estas 24 metrojn alta. La suda fasado prezentas dekstre la Rejnon k maldekstre Nederlandon. Sur la supra parto de la pordego estas prezentita la trapaso de la Rejno, kontraŭflanke estas la venkopreno de Mastrikto (Maastricht).

5 — MARTEN-PORDEGO:

Starigita en 1674 de Petro Bule (Bullet), por memorfesti militajn venkojn. La arko estas 17 metrojn alta. Deĵarden (Desjardins), Leongr (Le Hongre), Marsi (Marsy), Legro (Legros), kiuj dekoraciis la Versajlan palacon, prezentis sur la suda fasado la venkoprenon de Bezansono (Besançon) k la rompon de la Sankta Alianco, aliflanke la venkoprenon de Limburgo k la germanan malvenkon.

Sur la Marten-Bulvardo (Boulevard Saint-Martin): unue la Renesanc-teatro (La Renaissance) (1872), poste tiu de la Martenpordego (de la porte Saint Martin) (1873). Pli malproksime, la Ambigu-teatro (l'Ambigu) (1828).

6 — RESPUBLIKA PLACO:


Konstruita en 1854 de Osman (Haussmann). La Maĝenta bulvardo kondukas ĝis la Norda k Orienta stacidomoj, la Respublika avenuo al la Eksteraj bulvaroj, la Volter-bulvardo (Voltaire) al la Nacia placo (La Nation), la Turbigo-strato ĝis la Haloj (Les Halles). Centre de la placo staras monumento de la Respubliko (1883). La skulptisto Dalu (Dalou)

verkis la bronzajn bareliefojn; ili prezentas gravajn faktojn pri respublika historio. Dum la Komuno (La Commune) unu el la federaciaj estroj Delekluz (Delescluze) mortis sur bari-kado ĉe la komenco de Volter-bulvardo.

Sekvu la Templo-bulvardon (Boulevard du Temple), k la Kalvariin-bulvardon (des filles du Calvaire), kiu estas la plej malgranda el la grandaj bulvaroj (210 metrojn); ĝia nomo venas de religiulejo fondita en tiu loko en 1683. Oni vidas maldekstre la Vintran Cirkon (Cirque d'Hiver). Fine oni atingas Bomarŝe-bulvardon (Beaumarchais), la plej longa el la grandaj bulvaroj (750 metroj), kiuj interkomunikigas la Mag-dalen-placon k la Bastiljan placon.

Alveno en:

7 — BASTILJA PLACO: Priskribita sur paĝo: 35.



II

DUA PROMENADO

- 1 — KONKORD-PLACO (Place de la Concorde)
- 2 — DEPUTITEJO (Palais Bourbon)
- 3 — PARADA PLACO DE INVALIDO-DOMO
(Esplanade des Invalides)
- 4 — MILITALERNEJO (Ecole Militaire)
- 5 — EFEL-TURO (Tour Eiffel)
- 6 — ŜAJO-PALACO (Palais de Chaillot)

1 — KONKORD-PLACO: Priskribita sur paĝo: 16.

2 — DEPUTITEJO AŬ BURBON-PALACO:

Konstruita en 1722 de la itala arkitekto Girardini por la Burbon-dukino. La deputitaro kunsidas en ĝi de 1879. La aktuala ĉambrego estis konstruata en 1829-1832.

3 — INVALIDO-DOMO:

La Invalido-Domo estis konstruita laŭ la propono de Luvŭa (Louvois) en 1671 por la militkripluloj. La verkon projektis Liberal Bruant. Poste Julio Ardŭen (Jules Hardouin), Mansar (Mansart) verkis la planojn de la kapelo. La kupolo estas 105 metrojn alta. En 1861 oni deponis en la maŭzoleo konstruita de Viskonti (Visconti), la ĉerkon de Napoleono la 1a, revenigita en 1840 el la insulo Sankta Heleno. La manĝejoj k dormejoj servas nun kiel ekspoziciaj ĉambregoj de la armea muzeo.

De la placo estas rimarkindaj la ponto Aleksandro la IIIa trans la Sejno, la avenuo samnoma borderita de la Granda k Malgranda Palacoj, k funde la avenuo de la Elizeaj Kampoj.

4 — MILITA LERNEJO:

Fondita en 1751 (regado de Ludoviko la XVa) laŭ la peto de Sinjorino Pompadur (Pompadour), favorino de la reĝo. La konstruoj estis finitaj en 1772 (verko de Gabriel). La im-

pona meza pavilono estas ornamita per ok belegaj kolonoj de korinta stilo. Skulptita frontono kompletigas la dekoracion k kvarangula kupolo superstaras la tuton. La du soldatejoj, en Duken-Avenuo (Duquesne) maldekstre k en Sufren-Avenuo (Suffren) dekstre, ekzistas de post la dua imperiestreco. Antaŭ la konstruoj etendiĝas la Marsa Kampo (Champ de Mars), eks-manovro-kampo de la milita lernejo, aranĝita en 1770. Tie okazis en 1790 la festo de la Federacio, k poste la universalaj ekspozicioj en 1878, 1889, 1900 k 1937. Nun ĝi estas belega parko kun elegantaj domoj.

5 — EFEL-TURO: Priskribita sur paĝo: 18.

6 — ŜAJO-PALACO: Priskribita sur paĝo: 19.

TRIA PROMENADO

- 1 — NACIA PLACO (Placo de la Nation)
- 2 — BASTILJA PLACO (Place de la Bastille)
- 3 — VOGIZA PLACO (Place des Vosges)
- 4 — URBDOMA PLACO (Place de l' Hôtel de Ville)
- 5 — KASTELETA PLACO (Place du Châtelet)
- 6 — LUVRA PLACO (Place du Louvre)
- 7 — PLACO DE LA REĜA PALACO (Place du Palais Royal)
- 8 — TEGOLEJA ĜARDENO (Les Tuileries)
- 9 — KONKORD-PLACO (Place de la Concorde)
- 10 — ELIZEAJ KAMPOJ (Champs-Élysées)
- 11 — STELA PLACO (Place de l' Etoile)

1 — NACIA PLACO:

La bronza statuo de Dalu (Dalou), starigita sur la placo en 1899 meze de baseno, prezentas la respublikan triumfon.

Ĝi estas la plej vivplena, la plej potenca monumento el tiu speco.

La du kolonoj, verko de Ledu (Ledoux), kiuj enkadrigas la Tronan Avenuon (Avenue du Trône), estis starigitaj en 1788. Ili estis supre ornamitaj per statuoj de Filipo-Aŭgusto k de Sankta-Ludoviko dum la regado de Ludoviko-Filipo.

Eniru straton de Antonia kvartalo (rue du Faubourg St-Antoine).

Dekstre, en la Bernarda strato (Saint-Bernard), troviĝas la preĝejo »Sankta-Margareto« k la pseŭda tombo de Ludoviko la XVIIa.

Maldekstre, ĉe n^o 184, la malsanulejo »Sankta-Antonio« okupas la lokon de eksabatejo. Antaŭ n^o 151 la deputito Boden (Baudin) estis mortigata sur barikado (3. 12. 1851).

2 — BASTILJA PLACO:

Priskribita sur paĝo: 35.

Trairi la placon, ekiri Antonian straton, maldekstre, ĉe n^o 17, staras la protestanta preĝejo »Sankta-Mario« (1621), ĉe

- 7 — PLACO DE LA REĜA PALACO:
Reĝa Palaco priskribita sur paĝo: 15.

Maldekstre, en la Rivoli-strato:

- 8 — LA TEGOLEJA ĜARDENO:
Priskribita sur paĝo: 15.

- 9 — KONKORD-PLACO:
Priskribita sur paĝo: 16.

- 10 — ELIZEAJ KAMPOJ:
Priskribitaj sur paĝo: 17.

- 11 — STELA PLACO:
Priskribita sur paĝo: 17:

KVARA PROMENADO

- 1 — BASTILJA PLACO (Place de la Bastille)
- 2 — LUDOVIKA INSULO (Ile Saint-Louis)
- 3 — PRAURBA INSULO (Ile de la Cité)
- 4 — MIKAELA PLACO (Place Saint-Michel)
- 5 — SULPICA PLACO (Place Saint-Sulpice)

1 — BASTILJA PLACO:

Ĝi estis desegnata laŭ la ordono de Napoleono la 1a en 1803. Ĝia aspekto estis modifata pro la konstruo de la Liona strato (Rue de Lyon) (1847), de la stacidomo de Vinceno (Vincennes) k de la bulvardo Henriko la IVa (1886). Meze de la placo staras la Julia kolono.

Rimarku sur la placo k sur bulvardo Henriko la IVa la limojn markitajn per helaj pavimeroj, montrantaj la konturojn de la iama malliberejo La Bastiljo; ĝi estis starigata laŭ la planoj de Hug Obrio (Hugues Aubriot) (1370-1382) por servi kiel rifuĝejo al Karlo la Va dum perturbaj momentoj.


La unua malliberulo estis Aubriot mem.

El la famaj malliberuloj ni citu: Basonpier (Bassompierre), Volter (Voltaire), Mirabo (Mirabeau). La 14an de julio 1789, matene, la fortikaĵo estis sieĝata. Ĝia estro Lone (Launay) kapitulacis vespere je la 17a. La disfaligo komenciĝis tuj k sekvantan jaron oni dancis sur la loko de la detruita malliberejo.

Suriru bulvardon Henriko la IVa, transpasu ponton Suli (Sully) (1876), k vi alvenos al:

2 — LUDOVIKA INSULO:

Ĝi estas laŭlonge duonigata per la Ludovika strato (Rue Saint-Louis) kie rimarkiĝas preĝejo (1664-1726); ĉe n^o 7 arkadrestaĵo el la nobeldomo (detruita en 1840) de financisto Bretonville (Bretonvilliers); ĉe n^o 51, nobeldomo, kie instaliĝis ĉefekiskopejo de 1840 ĝis 1850. Maldekstre de la insulo troviĝas kajo de Betun (Béthune), k kajo d'Orlean (Orléans). La vido



IV

estas belega al ĉefkatedralo (Notre-Dame), praurba insulo (La Cité), Panteono. Ĉe n^o 12 kajo d'Orlean, notu medalionon almetitan sur la domon, kie naskiĝis la poeto Arver (Arvers). Dekstre de la insulo, ĉe la ekstremo de la Anĵu-Kajo (Anjou), notu domon de Lamber de Torini (Lambert de Thorigny), konstruita de Levo (Le Vau) (1640), dekoraciita de Lesuer (Lesueur) k Lebrun (Le Brun). Ĉe n^o 17 estis starigata en 1657 hotelo de Lozen (Lauzun), Bodeler (Baudelaire) k Teo-filo Gotje (Théophile Gautier) loĝis en ĝi. Ĉe la ekstremo de la Ludovika strato (alvare), transiru ponteton Sankta Lu-doviko. Alveno al:

3 — PRAURBA INSULO:

Ĝi estis la naskiĝloko de Parizo k unue nomiĝis Lutecia. Eniru straton Klūatr Notr Dam (du Cloître Notre-Dame), bordumanta publikan ĝardeneton de la ĉefepiskopejo k poste laŭiru straton Ŝanŭanes (des Chanoinesses), ĉefa vojo de eks-monaĥejo. Ĉe n^o 12 staras bela nobeldomo de la 17a jar-cento (dekstre strato Ŝantr) (des Chantres), kondukas ĝis la florkajo (Quai aux Fleurs). Ĉe n^o 19 la domo datumas de la 16a jarcento. Eniru Arkol-straton (rue d'Arcole) kondukantan al placo de la ĉefkatedralo (Notre Dame). Priskribita sur pa-ĝo: 12.

Trairu la placon preterpasante la hospitalon Otel-Die (l'Hô-tel-Dieu) (1868-1878). Iru maldekstren en Lutecian straton (de Lutèce), kie troviĝas komerca tribunalo (1865), vidalvide Juĝeja Palaco k la Konsierĝeri (Conciergerie), priskribitaj sur paĝo: 13.

Sekvu maldekstre, la Palac-Bulvardon (du Palais), trapasu la Mikaelan Ponton (Pont Saint-Michel). Alveno al:

4 — MIKAELA PLACO:

Konstruita dum la regado de Napoleono la IIIa, dekoraciita per monumenta fontano, verko de Daviu (Daviou). Iru al placo Sankta-Andreo de l'Artoj (Saint André des Arts), tute proksime k dekstre; ĝi datumas de 1809. Sekvu straton Otfej (Hautefeuille), ĉe n^o 5 staras malnova nobeldomo de la abatoj de Fekan (Fécamp) (16a jarcento). Alvenante en Ĝerman-Bulvardon (Boulevard Saint-Germain), oni troviĝas antaŭ me-dicina lernejo kies meza parto (enirejo ĉe n^o 12) estis kon-struita en 1775. La konstruoj estis pligrandigataj de 1878 ĝis

1900. Sekvu la bulvardon dekstren ĝis preĝejo Sankta Ĝermano (Saint-Germain des Prés) (542-558), kiun oni restarigis de 990 ĝis 1021. La pordego kondukanta al la navo ekzistas de la 17a jarcento.

Eniru Bonapart-straton k vi alvenos al:

5 — SULPICA PLACO:

Ĝi estis komencita en 1754. La statuoj de Bosue (Bossuet), Fenlon (Fénelon), Masijon (Massilon), Fleŝje (Fléchier) okupas niĉojn. Ĉe n^o 9 troviĝas malnova seminario, kies destino ŝanĝiĝis en 1906. La preĝejo Sankta-Sulpico estas fondita de la abatoj de Sankta-Ĝermano (Saint-Germain des Prés). La riparado estis komencita en 1646. La turojn k portikojn projektis Florantin Servandoni (1732). Notu en la najbaraj stratoj specialigitajn butikojn, kie oni vendas religiajn statuojn, sanktajn ornamaĵojn, bildojn k piecajn objektojn.

KVINA PROMENADO

- 1 — AUGUSTEN-PLACO (Place Saint-Augustin)
- 2 — LAZAR-STACIDOMO (Gare Saint-Lazare)
- 3 — KLIŜI-PLACO (Place Clichy)
- 4 — BLANŜ-PLACO (Place Blanche)
- 5 — PIGAL-PLACO (Place Pigalle)
- 6 — MONTMARTRA BAZILIKO (Sacré-Coeur)
- 7 — KAPEL-BULVARDO (Boulevard de la Chapelle)
- 8 — ĴORES-PLACO (Place Jean-Jaurès)
- 9 — BELVIL-BULVARDO (Boulevard de Belleville)
- 10 — PERLAŜEZ-TOMBEJO (Père-Lachaise)

1 — AUGUSTEN-PLACO:

La preĝejo estis starigita (1860-1871) de Baltar (Baltard) arkitekto de la Haloj, ĝi estas el miksitaj stiloj: bizanta, itala k renesanca. Antaŭ la preĝejo staras statuo de Johanino Darko (Jeanne d'Arc), de Paŭlo Dubua (Paul Dubois). Deirante de la statuo paŝu maldekstren en la straton Lapepinjer (La Pépinière), ĝis la Rom-strato.

Alveno antaŭ:


2 — LAZAR-STACIDOMO:

Ĝia grava persontrafiko k ĝia situo en Parizo kialigas la gravan movadon rimarkindan sur la najbaraj stratoj. Sekvu la Lazar-straton (Rue Saint-Lazare). Dekstre, ĉe n^o 109, rimarku la Havran trairejon. Alveno sur placo Etjen-Dorv (Estiennes d'Orves), kie staras la preĝejo La Triunuo (La Trinité), de renesanca stilo, verko de Balu (Ballu) (1861-1867). Turnu vin maldekstren, rigardinte la preĝejon, eniru Kliŝi-straton (Rue de Clichy), kie troviĝas la Pariza Kazino (Casino de Paris) ĉe n^o 15, fame konata pro siaj grandspektaklaj revuoj.

Alveno en:

3 — KLIŜI-PLACO:

Lokita sur la Eksteraj Bulvaroj (limo de Parizo dum la regado de Ludoviko la 16a). Suriru, dekstre, Kliŝi-bulvardon



(Boulevard de Clichy). Rimarku ĉe la angulo de la strato Forest kinejon Gomon (Gaumont), kies salonego estas unu el la plej gravaj.

Pli malproksime, en strato Raŝel (Rachel), rimarku la enirejon de la Montmartra tombejo kreita en 1795. Tie estis entombigataj verkistoj k artistoj konataj, inter kiuj: Luciano Gitri (Lucien Guitry), Labiŝ (Labiche), Teofilo Gotje (Théophile Gautier), Fratoj Gonkur (Frères Goncourt), Alfonsino Plesi (Alphonsine Plessis) ankaŭ nomita: la Sinjorino kun kamelioj, la familio de Gambeta (Gambetta), Sinjorino Rekamje (Récamier), Hektoro Berlioz (Hector-Berlioz).

Sekvu la bulvardon ĝis:

4 — BLANŜ-PLACO:

Okulfrapaj estas la nemoveblaj flugiloj de la Ruĝa Muelejo (Moulin Rouge). En la komenco de la nuna jarcento tiun ĉi muelejon oni uzis kiel reklamilon por fama balo, kies kvadrilo estis la ĉefaĵo. Sekvante la bulvardon, kiu estas centro de kabaretoj, rimarku dekstre la stratojn: Blanŝ (Blanche), Fonten (Fontaine), Pigal (Pigalle), kiuj konsistigas kvartalon de noktaj amuzejoj, petolejoj, de internacia gaj-vivado k ankaŭ de senbrida diboĉo. Tiu loko fariĝas vivplena vespere precipe post la fino de la spektakloj.

Alveno en:

5 — PIGAL-PLACO

Sekvu la bulvardon ĝis cirko Medrano, poste straton de la Martiroj (Martyrs), ĝis la Antonina strato (Rue Antoinette), k turnu dekstren. Oni vidas tie la preĝejeton nomatan Helpantinoj de la Purgatorio (Auxiliatrices du Purgatoire), loko kie naskiĝis en 1540, la potenca ordeno de la jezuitoj. Revenu ĝis la placo de la Abatinoj (Abbesses), kie staras preĝejo (1904). Eniru straton de la Abatinoj, k komencu la grimpadon de la monteto laŭ la strato Ravinjan (Ravignan). Maldekstre de la placo Emil Gudo (Emile Goudeau), kiun ĝi trairas, rimarku, ĉe n^o 13, la domon kie pentristoj loĝis, inter ili ni citu Pikaso (Picasso) k van Dogen. Reiru sur la placon k dekstre eniru en la straton Norven (Norvins), kiu kondukas en Tertr-placon (du Tertre). Ĉe n^o 21 staras la sidejo de la Libera Montmartra Kumunumo, kiu kulturas sur la monteto fantaziajn tradiciojn k gajan humoron. Ĉe Senis-

monta strato. (Rue du Mont-Cenis) staras la preĝejo Sankta Petro, komencita en 1134, finita je la fino de la 12a jarcento k riparita en 1908. Maldekstre de la preĝejo eniru straton Kavaliro de Labar (Chevalier de la Barre). Ĉe la angulo de tiu strato k la strato Labon (La Bonne) estis mortpafitaj la 18an de Marto 1871 la generaloj Kleman Toma (Clément Thomas) k Lekont (Lecomte) tuj post la interfratiĝo de la popolamaso kun la soldatoj. Tiu okazintaĵo estis la komenco de la Komuno. Montmartro restis sub la kontrolo de la federacianoj ĝis la 23a de majo.

Eniru en la straton Labon (La Bonne), por alveni antaŭ la:

6 — MONTMARTRA BAZILIKO:

Priskribita sur paĝo: 20

Dekstre, rigardante al la urbo, en la fundo de placeto, oni vidas soklon je la memoro de Kavaliro de Labar (Chevalier de la Barre). La statuo estis forprenata, verŝajne de la nazioj dum la dua mondmilito. La Kavaliro (1747-1766), akuzita pri difekto de krucifikso, estis senkapigata k lia korpo bruligata. Lia nomo restas simbolo por la liberpensulaj medioj.

Revenu antaŭ la bazilikon k trairu la deklivan parketon. Sekvu la straton Sevestr (Sevestre), k eniru, maldekstre, bulvardon Roŝŝuar (Rochechouart). Sekvu laŭ la sama direkto la:

7 — KAPEL-BULVARDO:

Alveno sur Stalingrad-placo. Tie estas ekstremo de Laviletbaseno (La Vilette), kiu interkomunikigas la Urk-kanalon (Canal de l'Ourcq) maldekstre, kun la Marten-kanalo (Canal Saint-Martin), dekstre:

8 — ĴORES-PLACO:

La Sekretan-avenuo (Secrétan) kondukas al Ŝomon-montetoj (Buttes Chaumont). Dekstre la Lafajet-strato (Lafayette) kondukas al la Oper-Placo. Sekvu Lavilet-bulvardon (La Vilette) ĝis:

9 — BELVIL-BULVARDO:

Maldekstre Belvil-strato k dekstre strato de la Templo kvartalo (rue du Faubourg du Temple) kondukanta al Res-

publika placo. Daŭrigu la vojon por eniri Menilmontan-bulvardon (Ménilmontant). Ĉe n^o 42, komenciĝas la Gambeta-avenuo, kie troviĝas la sidejo de S.A.T. (n^o 67). Alveno ĉe la orienta tombejo nomita:

10 — PERLAŜEZ-TOMBEJO:

Ĝi estas la plej vasta k la plej interesa en Parizo. Oni taŭgaranĝis ĝin en 1803 laŭ la planoj de Bronjar (Brongniart). Tie staras vizitebla kadavro-cindrigejo. En tiu tombejo solviĝis la lasta k sangoplena epizodo de la Komuno, la 28an de majo 1871. La 147 postvivintoj el la lastaj federacianoj, kiuj redute instalas sin en ĝi, estis mortpafitaj ĉe la muro (nord-orienta angulo). La kadavroj estis enterigataj en larĝa tranĉeo tuj elfosita sur la loko mem. Tabulo sur la muro memorigas pri tiu mondhistoria fakto. Proksime estis enterigataj pluraj revoluciemuloj, inter kiuj Henriko Barbus (Henri Barbusse).

SESA PROMENADO

- 1 — MIKAEL-PLACO (Place Saint-Michel)
- 2 — MIKAEL-BULVARDO (Boulevard Saint-Michel)
- 3 — KLUNI-DOMO (Hôtel de Cluny)
- 4 — PANTEONO (Le Panthéon)
- 5 — LUTECIA ARENO (Arènes de Lutèces)
- 6 — BOTANIKA ĜARDENO (Jardin des Plantes)

1 — MIKAEL-PLACO:

Priskribita sur paĝo: 37.

Lasante malantaŭ vi la Mikael-ponton, preterpasu la finon de Lauŝet-strato (la Huchette).

Rimarku la antikvajn domojn de la sekvotaj stratoj.

Eniru la straton Harp (La Harpe), antikva romana vojo.

Sekvu maldekstre la straton Sen-Sevren (Saint-Séverin) kondukantan al preĝejo de gotika stilo. Ĝia konstruado estis komencita en la mezo de la 13a jarcento. Oni modifis ĝin en 1530 k en 1681. Revenu laŭ la strato Sen-Sevren ĝis:

2 — MIKAEL-BULVARDO:

Tutmonde konata, ĝi estas vigla centro de la studenta kvartalo. Trairu la Ĝerman-bulvardon (Boulevard Saint-Germain), maldekstre, ĉe la angulo de ambaŭ bulvaroj, troviĝas la malnova:

3 — KLUNI-DOMO:

La ruinoj de la varmbanejoj (galla roma konstruaĵo), k la grandvaloraj kolektoj de la muzeo konsistigas tre interesan vidindaĵon. Sekvu la Mikael-bulvardon k maldekstre la straton Somerar (Sommerard), kiu kondukas ĝis la ĉefa fasado de la malnova domo starigita en 1340 laŭ ordono de la abato de Kluni (Cluny). De 1600 ĝis 1681 la Kluni-Domo servis kiel restadejo al papaj ambasadoroj, kies plej fama estis Mazarino. La nuna muzeo estis inaŭgurata en 1844. Retorne iru k daŭre sekvu la Mikael-bulvardon ĝis la Sorbon-placo, kie staras statuo de Aŭgusto Kont (Comte). La Sorbono (Sorbonne), kiu havas

reputacion tutmondan, estis restarigata de 1624 ĝis 1642. La preĝejon el jezuita stilo planis Lemersje (Lemercier). La aranĝo de la nunaj konstruoj estis realigata de Nero (Nérot), de 1885 ĝis 1901. Eniru straton Viktor Kuzen (Victor Cousin), dekstren, oni trafas straton Suflo (Soufflot), maldekstre ĉe ĝia fino staras:

4 — PANTEONO:

Priskribita sur paĝo: 21.

La panteona placo, komencita en 1770, estis rearanĝata en 1804. Rimarku, dekstre, la urbdomon de la 5a distrikto, maldekstre, la jursciencan fakultaton starigitan de Suflo (Soufflot), en 1772. Sur la sama flanko staras la Biblioteko Sankta Genoveva (Sainte Geneviève), verko de Labrust (Labrouste) 1844.

Preterpasinte la Panteonon, maldekstre, oni alvenas antaŭ la preĝejo Sankta Stefano (Saint-Etienne du Mont) (1492—1622). Dekstre, sekvu la straton Klotild (Clotilde), kie staras la liceo Henriko la IVa (Henri IV). Eniru straton Lestrapad (L'Estrapade), poste straton Blenvil (Blainville), kiu kondukas al placo Kontreskarp, (de la Contrescarpe). Marŝu iom en la strato Kardinalo Lemuan (Cardinal Lemoine), por eniri straton Rolen (Rollin) traŭru straton Monĵ (Monge), eniru straton Navar (Navarre), kie troviĝas enirejo al publika parketo ĉirkaŭanta la ruinojn de:

5 — LUTECIA ARENO:

La dato de ĝia konstruado estas duba. Ĝi estis detruata dum milita invado en 280. La restaĵoj estis retrovataj en 1869, kiam oni esploris la grundon ĉe n^o 49 strato Monĵ, sed metodaj esplorfosadoj estis entreprenataj nur en 1883 por elrubigi k restarigi la ruinojn.


Revenu laŭ strato Navar (Navarre). Eniru maldekstre, straton Laseped (Lacépède), k poste straton Katrfaj (Quatrefoies), kondukantan al placo de la Puto de l'Ermite (Puits de l'Ermite), kie troviĝas enirejo al la pariza moskeo.

Priskribita sur paĝo: 60.

Eniru straton Georgo Depla, (Georges Desplas), k ĉirkaŭiru maldekstre laŭ la stratoj Dobenton (Daubenton), k Ĵofrŭa Sentiler (Ceoffroy-Saint-Hilaire), por alveni ĉe la angulo de strato Kuvie (Cuvier) antaŭ unu el la enirejoj de la:

6 — BOTANIKA ĜARDENO:

Priskribita sur paĝo: 22.



VI

SEPA PROMENADO

- 1 — LA HALOJ (les Halles)
- 2 — MUZEO PRI ARTOJ K METIOJ (Arts & Métiers)
- 3 — RESPUBLIKA PLACO (Place de la République)
- 4 — MARTEN-KANALO (Canal Saint-Martin)
- 5 — PARKO DE ŜOMON-MONTETOJ (Buttes-Chaumont)

1 — LA HALOJ:

La instalo en tiu loko de la pariza provizumejo datumas de 1110. Filipo-Aŭgusto plivastigis k per muro ĝin ĉirkaŭigis en 1183. La nuna konstruo estis starigata sub la regado de Napoleono la IIIa. En 1936 du novaj pavilonoj estis malfermataj.

Tre frumatene la vivo de tiu kvartalo atingas la plej altan gradon. Mil scenoj amuzas la vizitanton, kiu ne timas kontraŭiri interpuŝigon.

Ekirante de la subtera Hal-stacio (Halles), eniru Turbigostraton k sekvu ĝin ĝis Marten-strato (Saint-Martin). Tuj, maldekstre, staras preĝejo starigita en la 13a jarcento, rekonstruita en la 15a k modifita en la 16a. La fasado k sonorilturo riparitaj estas en gotika stilo flamforma. Sekvu ĉiam la Marten-straton, laŭirante la muzeon pri:

2 — ARTOJ K METIOJ:

La enirejo troviĝas ĉe n^o 292 de Marten-strato.

Ĝi estas stablo por teknika instruado, industria muzeo, eksperimentejo pri industria provoj. La muzeo konservis krome la preĝejon k la manĝejon de la malnova monaĥejo »Sankta-Marteno de la Kampoj« (Saint-Martin-des-Champs). Kreita de la »Konvencia« registaro en 1794, ĝi estis instalata en la konstruoj de la monaĥejo en 1799. Maldekstre, ĉe la angulo de la strato Ver-Bua (Vert-Bois), staras rekonstruita turo, kiu estis parto de la monaĥeja ĉirkaŭmuro. La najbaran fontanon oni konstruis en la 18a jarcento.

Ĉirkaŭiru la muzeon laŭ stratoj Ver-Bua (Vert-Bois) k Vo-

la parko estas la impona maso da rokoj, duone artefarita, 50 metrojn alta, kiu ŝajne subite leviĝas el la lago. Du pontoj kondukas al ĝi. Unu el ili nomiĝas Ponto de la Sinmortiguloj.

Templeto ornamas la supron de la laga insuleto. Kaskado 32 metrojn alta estas vidinda.



Photo Yvon

Lago en Bulonja arbaro

OKA PROMENADO

— BULONJA ARBARO —

- 1 — ĈEVALKUREJO DE OTEJ (Auteuil)
- 2 — ĈEVALKUREJO DE LONŜAN (Longchamp)
- 3 — PRE-KATLAN (Pré Catelan)
- 4 — BAGATEL-PARKO (Bagatelle)

La Bulonja arbaro fariĝis loko por promenadoj nur en la 17a jarcento. Ĝi estis vizitata de la elegantularo nur en la 18a. En 1815 la rusa k angla armeoj, kiuj tendumis tie, kva-zaŭ dezertigis la arbaron.

Sub la impulso de Napoleono la IIIa, Osman (Hausmann), aliigis k aranĝis ĝin en 1852. Por esplori piede tiun vastan parkon, proksimume 900 hektaran, oni bezonus certe plurajn tagojn.

1 — ĈEVALKUREJO DE OTEJ:

Ekiru de la placo Otej-pordo (Porte d'Auteuil), sekvu la

4 — BAGATEL-PARKO:

Ekiru de la Majo-Pordo (Porte Maillot), sekvu la vojon de Sablon al Majo-pordo (Sablons à la Porte-Maillot), ĝi kondukas al la enirejo de la Alklimatiga parko (Jardin d'Acclimatation), kiu estas ankaŭ zoologia parko k centro por distroj.

Sekvu la vojon de Madrid al Majo-pordo (Madrid à la porte Maillot) ĝis la Madrid-pordo (Porte de Madrid), loko de la malnova kastelo de Madrid, konstruita dum la regado de Francisko la 1a en 1528 k disfalgita en 1793. Poste laŭiru la Riŝar-Valas-bulvardon (Richard-Wallace) ĝis la Bagatel-pordo (porte de Bagatelle) k maldekstre la vojon Sevr al Neji (Sèvres à Neuilly) por eniri la Bagatel-parkon. Tie staris antaŭe paviloneto, kiu estis anstataŭigita per konstruo laŭ la planoj de la arkitekto Belanĵe (Bellanger). Samtempe angla specialisto desegnis la parkon laŭ la modelo de Monso-parko (Monceau). Bagatel estis loko pri p'ezuraĵoj dum la revolucio en 1789 k tio savis ĝin de detruo. Eliru laŭ la pordo al la vojo de Bagatel-lagoj (lacs de Bagatelle).

Sekvu tiun vojon ĝis la aleo de Reĝino Margareto (Allée de la Reine-Marguerite). Eniru maldekstre la Lonŝan-Aleon (Allée de Longchamp) ĝis la Majo-pordo.




Photo Yvon

Vincena kastelo

NAŬA PROMENADO


VINCENA ARBARO (Bois de Vincennes)

- 1 — DORE-PORDO (Porte Dorée)
- 2 — ZOOLOGIA PARKO
- 3 — KASTELO DE VINCENO (Château de Vincennes)

La Vincena arbaro nuntempe aneksita al la pariza urbo estis aranĝita de Alfand (Alphand)-(1817-1891), ĉef-inĝeniero pri promenejoj de la urbo. Ni rememorigu, ke en tiu loko okazis en 1931 la fama kolonia ekspozicio, kies sukceso estis mondkonata.

1 — DORE-PORDO:

Ĝi estas la enirejo al la Vincena arbaro, certe la plej trapasata precipe je alproksimiĝo de la sunaj tagoj. Kiam oni havas maldekstre de si Sult-Bulvardon (Soult) k dekstre Poniatoŭski-bulvardon sekvu la Domenil-avenueon (Daumesnil), maldekstre troviĝas tuj, la kolonia muzeo instalita en 1935. Ĝi enhavas akvarion tre vidindan pro la nombro k diverseco de la ekspoziciitaj specimenoj.



IX

Dekstre de la muzeo, rimarku la lernejon pri praktika arbokulturo de la pariza urbo. Sekvu la Domenil-avenueon ĝis:

2 — ZOOLOGIA PARKO:

Ĝi estas klasigita inter la plej bone aranĝitaj. Kuŝante en admirinda loko, ĝi prezentas pentrindan klerigan spektaklon. La grandaj rabobestoj ĝuas tie kavernojn, la fokoj k hipopotamoj basenojn, la simioj arbojn; ĉiu besta kategorio retrovas preskaŭ sian kutiman klimaton sub libera ĉielo, relativan liberecon pri moviĝo k kelkajn el la kondiĉoj de sia origina regiono.

La vizitanto kaptas laŭ la vivanta modelo la kutimajn sintenadojn de la bestoj, kiujn li observas, iliajn subitajn movojn malpaciencajn aŭ kolerajn, iliajn ruzojn k morojn.

La atmosfero, en kiu turniĝe manovras tiuj bestoj, facile elvokas image bildon pri la malproksimaj landoj, kie ili naskiĝis k vivis tute libere.

Tiamaniere, distrante sin, la publiko, precipe la infanoj, povas lerni interesajn ĉapitrojn pri naturscienco.

3 — KASTELO DE VINCENO:

La ĉefturo ekzistas de 1183. La nuna kastelo estis konstruata en la 14a jarcento sur la antaŭa loko de ĉasa pavilono starigita sub instigo de Ludoviko la VIIa.

Konservante la kastelon kiel reĝan restadejon, Ludoviko la XIIa utiligis ĝin ankaŭ kiel ŝtatan malliberejon k entreprenis ellaboraĵojn, kiuj estis daŭrigataj dum la regado de liaj posteuloj.

La kapelo, en gotika stilo, estis finita nur en 1552. La reĝa k reĝina pavilonoj, komencitaj en 1560, estis rekonstruitaj proksimume je la fino de l'regado de Ludoviko la XIVa.

La kastelo ne plu estis loĝata post la regado de Ludoviko la XIVa. Ĝi estis dependaĵo de la Bastiljo ĝis la 14a de julio 1789. Fuke (Fouquet), Mirabo (Mirabeau), interalie, estis tie enkarcerigitaj. La Duko d'Angen (d'Enghien) estis pafmortigata en ĝiaj fosaĵoj (1804). En 1814 k 1815 la generalo Domenil (Daumesnil) defendis ĝin kontraŭ la invadantoj. La ministroj de Karlo la Xa estis enkarcerigitaj en ĝi (1830).

De tiam ĝi fariĝis milita centro, poste muzeo (1831). Muzeo k biblioteko pri milito de 1914—18 estis instalataj en 1924 en la reĝina pavilono.

La vizitantoj, kiuj ŝatas piediri, povos sekvi la Minim-avenuon (des Minimes), kiu kondukas al la samnoma lago.

Ĉirkaŭiru la lagon, dekstre, por reatingi la avenueon de la Bela Gabrielino (Belle-Gabrielle). Sekvu la straton de Turel al Gravel (de la Tourelle à Gravelle), forlasante dekstre la ĉevalkurejon de Vinceno, poste la pafkampon. Sekvu la avenueon de la Estradoj (Tribunes), ĉirkaŭirante parton el la Domenil-lago k revenu al la deira punkto t.e.: Dore-Pordo.



Respublika placo

ALIAJ VIDINDAĴOJ

(Ne priskribitaj en aliaj ĉapitroj)

FONTANO DE LA SENKULPULOJ — (Fontaine des Innocents) Subtera stacio: Châtelet.

Ĉarma verketo, kiun lasis la Renesanco. Ĝi estis finkonstruata en 1549 de la arkitekto Petro Lesko (Lescot) k de la skulptisto Johano Guĵon (Goujon). Speciale rimarkindaj estas la nimfoj.

LA KLOAKOJ — (Les Egoûts).

La enirejoj por la vizitoj estas en Konkord-Placo (apud Lil-statuo) k en Magdalen-placo. La kloakaro konsistas el 4 ĉefkloakoj: 30 km entute, duagradaj kloakoj: 70 km, k 1150 km da elementaj kloakoj.

La akvoj estas fluigataj al purigaj kampoj, kiuj kovras pli ol 5000 hektarojn. La tuneloj entenas ankaŭ la akvokonduki-lojn, telegrafajn k telefonajn dratojn, pneŭmatikajn poŝtajn tubojn ktp... La personaro konsistas el 900 laboristoj.

KUPOLO DE INVALID-DOMO (Dôme des Invalides) Subtera stacio: Invalides.

Konstruita de 1679 ĝis 1706, ĝi estas la plej bela religia monumento starigita en Francio post la Renesanco. Ĝi estas kovrita per plumbo orotegita. La pinto de la kruco troviĝas je 105 m super la tero. La interno estas ankaŭ tre vidinda. Tie kuŝas la Maŭzoleo de Napoleono.

LIBRO-BROKANTISTOJ — (Bouquinistes) — Subtera stacio: Saint-Michel.

Tre pitoreska estas tiu vendejo instalita ĉe la randmuretoj de la kajoj en najbareco de la prainsulo. Tiuj ekspozicioj estis plurfoje malpermesataj en la pasinto. En 1895 la brokantistoj ricevis rajton fiksi siajn skatolojn al la muroj k la vendejo fariĝis familiara bildo el la pariza vivo.

LA SUBTERA FERVOJO (Le Métropolitain).

Oni ekkonstruis ĝin en 1898. La unua vojo funkciis la 19/7/1900 (Porte-Maillot-Vincennes). La vojaro estas nun 165 km, plej grand-parte subtera; al ĝi oni devas aldoni la Sovojon (Ligne de Sceaux) 29 km. Ĝi konsistas el 14 vojoj kun 341 stacioj. La ĉefa instiganto de tiu giganta organizaĵo estas Bienvenu (Bienvenue). En 1945 la trajnoj transportis 1500 milionojn da uzantoj. La personaro konsistas el 17.500 gelaboristoj.

MONSO-PARKO (Parc Monceau) — Subtera stacio: Monceaux.

Tre aristokrata parko, kiu datumas de la 18a jarcento. Ĝi entenas ruinojn k belajn monumentojn k statuojn.

MONSURI-PARKO (Parc de Montsouris) Subtera stacio: Cité Universitaire.

Kreita de 1875 ĝis 1878. Malebena, 16 hektara. Supre staras la »Bardo« reprodukto de la beja palaco de Tunizo. Tie troviĝas meteorologia observejo.

MOSKEO (Mosquée) Subtera stacio: Monge.

Fakte temas pri malgranda musulmana civito, kiu konsistas el tri partoj: religia, kleriga, komerca. Ĝi estis konstruita de 1922 ĝis 1926 laŭ stilo hispano-maŭra dank'al monkeletoj

faritaj en Nordafriko. La urbo Parizo donacis la terenon. La minareto estas 33-metra. La interno estas tre vizitinda. Inter la valoregaj objektoj multaj estis donacitaj el diversaj lokoj de la vasta musulmana landaro.

NAPOLEONA MAŬZOLEO (Tombeau de Napoléon).

Sub la kupolo de la Invalido-Domo konstruita en 1843. Ĝi estas el ruĝa granito de Finnlando. Tiu luksega tombo estas 4 m longa, 2 m larĝa, 4,50 m alta.

POŜTMARKA BORSO (Bourse aux timbres) Subtera stacio: Franklin-Roosevelt.

Ĝi okazas plenaere apud la Marinji-teatro (Marigny), ĉiu ĵaŭde, dimanĉe k en feriaj tagoj.

PUL-VENDEJO (Marché aux puces) Subtera stacio: Porte de Clignancourt.

Temas pripitoreska vendejo instalita ĉe la tielnomata »zono«. Laŭlonge de stratoj, de liberaj terenoj estas ekspoziciataj ĉiusecaj objektoj novaj k malnovaj. Tie oni vidas iom el la plej mizeraj k malpuraj lokoj de la urbo.

ROMANAJ BANEJOJ (Thermes) — Subtera stacio: Odéon.

Ili kuŝas ĉe la kruciĝo de la Mikael-bulvardo k Ĝerman-bulvardo. La konstruado okazis komence de la IIIa jarcento. Ili konsistas el diversaj salonoj, kies plej granda estas 20 m longa, 11,50 m larĝa, 18 m alta kun muroj 2 m dikaj. La akvo venis el Renĵis (Rungis), je cirkaŭ 12 km.

SANKTA ĜERMANO (Saint-Germain-des-Prés) Subtera stacio: Saint Germain-des-Prés.

La plej malnova preĝejo en Parizo. Nur ĝi venas el la romid-stila epoko (turo k navo). Oni ĝin ekkonstruis komence de la XIa jarcento.

SENKLU-PARKO — (Parc de Saint-Cloud). Subtera stacio: Pont de Sèvres.

Ĝi kovras 392 hektarojn. Vidindaj estas la granda kaskado, la tunelo de la okcidenta aŭtovojo (850 m). De l'teraso de la Lanterno, 94 m super la Sejn-nivelo oni ĝuas tre belan panoramon sur Parizo. En la Bretejl-pavilono (Pavillon de Brete-

uil) estas instalita la Internacia Oficejo de la peziloj k mezuriloj. Tie kuŝas la norma metro.

SANS-NOBELDOMO — (Hôtel de Sens) — Rue du Fauconnier. Subtera stacio: Pont-Marie.

Konstruita de 1474 ĝis 1519. Valorega ekzemplero de l'privata arkitekturo de la XVa-jarcento.

SO-PARKO — (Parc de Sceaux). Subtera stacio: Parc de Sceaux aŭ Bourg-la-Reine.

La nunan kastelon oni konstruis en 1856. Ĝi entenas Pariz-regionan muzeon. La parko estas verko de Lenotr (Le Nôtre). Vidindaj estas la malgranda kastelo, la Aŭrora pavilono, la Hanovra pavilono. Antaŭ la kastelo estas belega aleo (800 m), malantaŭ ĝi mirinda perspektivo (1500 m), kiu kruciĝas ĉe la balustrado de la numidoj kun la perspektivo al la kanalo.

Sude de la kastelo la Dukina aleo kondukas al la Grandaj Kaskadoj, kiuj elverŝiĝas en la Oktogonon. La Granda kanalo estas 1 km longa.

STUDENTA CIVITO — (Cité Universitaire). Subtera stacio: Cité Universitaire.

Kreita en 1920 k kovranta pli ol 40 hektarojn. Ĝi konsistas el 19 fondaĵoj francaj k eksterlandaj kun ĉirkaŭ 2400 ĉambroj por studentoj. Ĝi krome posedas komunajn servojn, bibliotekon, ĝardenon, sportejon.

Ĝi formas el individua k socia vidpunktoj tre taŭgan centron por la studentaro. La tuto havas tre pitoreskan aspekton pro la diverseco en la stilo de la pavilonoj; inter ili estas rimarkindaj la japana, hindoĉina, svisa, nederlanda, dana, sveda, hispana, brita k greka.

VANDOM-KOLONO — (La Colonne Vendôme). — Subtera stacio: Tuileries aŭ Opéra.

La placo estas admirinda arkitektura tuto konstruita sub la regado de Ludoviko la XIVa (1687—1720).

Laŭ la samaj proporcioj kiel la Kolono al Trajano (en la roma forumo), tiu kolono, laŭ la dorika stilo, estis konstruita en 1806 ĝis 1810 k tegita per la bronzo de 1200 kanoj, kiujn kaptis la napoleona armeo. Ĝia alto estas 44 m, ĝia diametro 3,60 m. La spiralo estas 260 m. La bronzo pe-

zas 232.000 kilogramojn. Ĉe la supro, statuo de Napoleono, kiun oni atingas per interna ŝtuparo. En 1871 la Komuno renversis la monumenton, kiu estis restarigata en 1875.

VERSAJLO — (Château de Versailles). Vagonaroj en: Montparnasse aŭ Invalides.

Konstruita de Ludoviko la XIVa ekde 1661 sub gvidado de Levo (Le Vau) k poste Mansar (Mansart). Ekde 1682 ĝi estis la sidejo de la monarkio.


El la parko la vido al la konstruo (400 m longa), estas plej majesta.

La interno estas tre vizitinda, inter aliaj mirindaĵoj atentu la galerion de la speguloj (Galerie des Glaces). — La ĝardenoj estas verko de Lenotr (Le Nôtre).

Maldekstre: la Oranĝarbejo, funde: la Granda kanalo.

Ĉie estas dissemitaj ornamaĵoj el bronzo, marmoro k plumbo, verkoj de la plej famaj skulptistoj de la 17a jarcento.

La parko kovras 1738 hektarojn. En ĝi tre vidindaj estas du palacetoj: Granda k malgranda Trianon. En la sama parto, meze de rava pejzaĝo, staras la domaro de Maria-Antonia (Hameau de Marie-Antoinette).




Efel-Turo

Photo Yvon



Presejo: Trøjborg bogtrykkeri - Herluf Trollesgade 24 - Århus - Danio





PARIS
PLAN D'ENSEMBLE
PAR
ARRONDISSEMENTS
MÉTROPOLITAIN

Echelle : 33.000°

CARTES TARIDE
18 - 20, Boulevard St Denis - PARIS.

LÉGENDE
Métropolitain en exploitation en construction
Stations de correspondances
Limites d'Arrondissements
Lignes de Chemins de fer Stations Tunnel
Principaux monuments - Eglises - Mairies



Książnica Podlaska
im. Łukasza Górnickiego w Białymstoku



000988230